




# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



ANTAŬ  
120 JAROJ  
NASKIGIS LA INICIATINTO  
DE PLANLINGVO-ESPERANTO  
D-RO L.L. ZAMENHOF  
\* 15. 12. 1859 \*

1979 · 5 · (75)

# FEZKO

**NÁRODNÍ PŮDNIK**

**NOSITEL ŘÁDU PRÁCE**

podnik s dlouholetou tradicí a zkušenostmi,  
který byl za výsledky dosažené v r.1977 a 1978  
vyznamenán vládou ČSSR a ÚRO podvkráté  
Rudým praporem 6.pětiletky

## **VYRÁBÍ**

- dámské pláštové tkaniny
- úplety pro svrchní odívání
- barety, čepice
- vlněné šály a příkrývky
- příze
- papírenská síta a plstěnce



**značka spokojených zákazníků**



# SEMINARIO KAJ KONSULTIĜO



En la urbo Mělník dum la 5-a ĝis 8-a de oktobro okazis konsultiĝo de ĉefaj funkciuloj de ĈEA. Pli ol 80 personoj pritraktis dum ĉi tiuj tagoj diversspecajn temojn ekz.:

- kultura politiko de nia ŝtato
- ideologiaj bataloj en Esperanto-movado
- 10-jara ekzisto de nia asocio
- niaj rilatoj al grandaj internaciaj E-asocioj
- strukturo de ĈEA kaj taskoj post III-a ĝia kongreso
- statuto de UEA kaj la Universala kongreso en Luzern
- reguloj por laboro de lokaj grupoj de ĈEA
- plano de ĈEA por la jaro 1980
- interlingvistiko - enkonduko.

Ekstis vasta diskuto al la temoj, sed ankaŭ al aliaj, kiuj estis tuŝitaj dum la traktadoj.

Parton de la kunveno partoprenis ankaŭ oficiale la reprezentanto de ministerio de kulturo de ĈSR k-ino Li-buše Vaňková.

Oni povas diri, ke tiuj kunvenoj ĉiam alportas novajn informojn kaj helpas pli bone kompreni ofte komplikajn problemojn de nia movado.

Estas bone, ke nuna ekonomia situacio de ĈEA ebligas partopreni tiujn bezonajn kunvenojn al senditoj de LG. Prezidanto de la asocio Dr. Jermář fine de lasta kunveno en siaj vortoj substrekis, ke li ĉefe kritikos: "Estas evidente, ke organoj gvidantaj la asocion vere konsolidiĝis, scias kion fari kaj sisteme plenumas akceptitajn taskojn, forĵetis ĉiujn anarkismajn estintajn metodojn

ofte plenaj de ĥaosa labormaniero. Bedaŭrinde samon oni ne povas diri pri laboro en lokaj grupoj. En diskutoj, kiujn mi devis ĉi tie aŭskulti, kvankam ni montris kiamaniere oni devas labori kaj agi, vi havis tute malajn opiniojn. Povas esti, ke vi ne rimarkis, ke la celo estas enkonduki ankaŭ en laboron de LG samajn labormetodojn, kiujn praktikas la estraro aŭ Centra komitato de ĈEA. Estas tute klare, daŭrigis la prezidanto de ĈEA "ke vortoj ne signifas, ke ni ne havas sukcesojn. Se mi rememoros periodon antaŭ kvin jaroj, ekestas nekomparebla diferenco. Sed tamen ni devas altigi la nivelon ankaŭ en nia laboro. Ankaŭ vi, laŭ mia opinio, devas prepari la ordon ne nur en administraj aferoj, sed en viajligoj kaj kontaktoj kun superaj organoj, ĉe kiuj vi laboras aŭ kun kiuj vi kunlaboras, en viaj planoj de agado, strukturo, sed ankaŭ, ke ni jam fine ĉesu kun tiaj endogenaj labormetodoj. Ni devas trovi novajn progresajn metodojn ankaŭ en informado kaj forĵeti tiujn malnovajn, per kiuj estis eble propagandi niajn celojn antaŭ kvardek-kvindek jaroj. Bedaŭrinde sufiĉe da pli aĝaj geesperantistoj ilin uzas kaj forgesas, ke tia agado estas preskaŭ ĉiam senefika kaj ofte kontraŭ ni en la tempo de moderna mondo. Ni ofte preferas diversajn simbolojn en nia movado kaj substrekas ilin /insignojn, verdan koloron, flagojn, stelojn ktp./, diskutas pri tiuj, laŭ mi, sensignifaj aferoj, anstataŭ interkonatiĝi kun esenco de la movado, kio estas interlingvistiko, kio estas propagando de lingvo, kian signifon havas planita lingvo ktp. helpe de sciencaj argumentoj".

Poste li skizis ankoraŭ pluajn punktojn de nia estonta laboro. Forta aplaŭdo esprimis, ke partoprenantoj bone ekkomprenis celojn de la asocio kaj ni esperas, ke ĉi tiu kunveno helpos en ilia laboro.

-kŭz-

# internacia panoramo

SEFT 1979

La kampadejo C-86 estas situata proksime de vilaĝo Thomsdorf, regiono Feldberg, inter la lagoj Dreetz kaj Krüselin, proksime de la lagoj Carwitzer See, Schmäler Luzin, Zansen, Breiter Luzin kaj Haussee. El vilaĝo Carwitz post 15 minutoj oni atingos Fazeolan insulon, paradizon de naturamikoj. En Carwitz troviĝas malgranda muzeo de germana verkisto Hans Fallada.

En SEFT 1979 /Somera Esperantista Familia Tendaro/ĉeestis esperantistoj el GDR, kvar poloj kaj du ĉeĥoj el Pardubice. Estas bedaŭrinde, ke nur du ĉeĥoj, ĉar SEFT vere estis interesa. Sub verda flago staris tie 13 tendoj, 8 aŭtomobiloj kaj kelkaj bicikloj. Oni povis aŭ private aŭ komune amuzi. El komunaj aranĝoj estas rimarkindaj: interkonatiga vespero, rostaĵvespero, gulaĝvespero, adiaŭa vespero, prelego kun lumbildoj, promenadoj, fiŝkaptado, fungokolektado, boatado, sporta konkurso, sunbanado kaj naĝado.

Ĉiuj partoprenintoj promesis venontjare denove renkontiĝi en SEFT, kiu efektiviĝos la lastan semajnon de aŭgusto, t. e. de la 23-a ĝis la 30-a aŭgusto 1980.

-erk-



Post riĉa fungokolektado en SEFT 1979



**DUM VIA VIZITO EN ĈSSR**  

---

**VIZITU ANKAŬ PARKON**  

---

**DE KULTURO KAJ RIPOZO**  

---

**EN BRATISLAVA**



## ESPERANTA MONERO

En serio "La Grandaj Poloj" eldonis la Ŝtata Monfarejo en Varsovio argentan moneron en la nominala valoro de 100 zl., kun portreto de D-ro L.L.Zamenhof sur la unua flanko kaj sur la dua kun la ŝtata pola blazono kaj kutimaj indikoj de la Pola Nacia Banko. Eldonkvanto: 30 000 ekz.

## INTERNACIA ESPERANTO - KURSEJO

Sur deklivo de la montaro Rodopo apud urbo Smoljan en komunumo Pisanica konstruis bulgaraj esperantistoj helpe de la ŝtata subvencio /ĉ.12 milionoj da kronoj/ belegan, romantike situitan, komfortan kaj modernan centron por la familiaj feriadoj kaj instruado de Esperanto. Je la dispono estas 200 litoj, hotela nivelo, bona kaj sufiĉega manĝaĵo, societaj ejoj, legejo ktp. Disponebla ekde la 1.8. 1979, ĉiam ekde la 1-a ĝis la 14-a, ekde la 16-a ĝis la 29-a, en dusemajnaj etapoj dum la tuta jaro. Dusemajna restado kun 4 ekskursoj, tri manĝoj ĉiutage ĉ. Kĉs 1200 /en tendoj/, ĝis Kĉs 2.000,-. Informojn, aligilojn: ESPERANTO, Steinerova 56 801 00 Bratislava.

## HOTELO ĈAJKA APUD VARNA POR ESPERANTISTOJ

Ekde la 16.9.-29.11.1979 kaj ekde la 1.3.-14.6. 1980 estas hotelo Ĉajka disponebla por esperantistoj. En la hotelo estas plejparte trilitaj ĉambroj, malvarma kaj varma akvo, tri manĝoj ĉiutage, abundaj kaj bongustaj. Ĉiu ĉambro havas balkonon kun panoramo al la maro. Antaŭ la hotelo estas plaĝoj, rapida aŭtobusa kaj ŝipa komunikado laŭ la tuta bulgara marbordo. Dusemajna restado kun la manĝado kaj kvar ekskursoj ĉ. Kĉs 1600,---. Informojn, aligilojn: ELBO, Steinerova 56 801 00 Bratislava.

TUTPOPOLA HEROAĴO estas titolo de la nova soveta filmo en la Esperanta mutacio, priŝkribanta herojajn batalojn de la tuta popolo kontraŭ la faŝismo.

# RONDETA VIVO

BRNO - En Biblioteko de Jiří Mahen en la koridoro vitrino estis instalita ekde la 15.9. ĝis 29.9. ekspozicio de E - lib-

roj, gazetoj ktp. Kvankam nur en la vitrino, tamen aperis pri ĝi pluraj favoraj gazetartikoloj. Preparaĵo s-ano Zd.Hrŝal.

ČESKÁ TŘEBOVÁ - Fine de julio 1979 okazis unuaforte internacia E-edziĝfestado inter animo de la loka EG Libuše Košťová kaj Fl. Gabalda el Francujo. Anoj

# POZLACENÉ JUBILEUM MIKULÁŠOVICKÉHO KOVOPRŮMYSLU

Mikulášovičtí brusiči nožů a nůžek byli známi již v 18. století ve střední a částečně i v západní Evropě. A již v roce 1794 byla v Mikulášovicích založena první továrna na výrobu nožů a nůžek.

V roce 1955 bylo několik firem pro výrobu nožířského a také kancelářského zboží sloučeno v jeden národní podnik - Mikulášovický kovoprůmysl s ochrannou známkou MIKOV.

Tradice zavazuje - ani dnes ji n.p. Mikov nezůstává nic dlužen. Pod ochrannou známkou Mikov a "Šermíř" vyváží nožířské zboží:

nože kuchyňské

řeznické

ocílky

dýky

lovecké nože zavírací

kapesní nože celonerez a se střenkami z plastu  
a další v různém provedení

nůžky všeho druhu

zahradnické nože

elektrikářské

do 58 zemí, prostřednictvím PZO Merkura.



Kancelářské výrobky n.p. Mikov vyváží prostřednictvím PZO Pragoexport do 67 zemí, pod ochrannou známkou KIN.





Ořezávací strojky na tužky  
děrovače, sešíváčky, mechaniky do pařadačů,  
obrušovátka, barevnáky, stojánky na razítka,  
připínáčky, spony - dopisové, vzorové, akto-  
vé a řadu dalších kancelářských potřeb.

Inovaci výroby a racionalizací výrobních procesů  
je n.p. Mikov kvalitou svých výrobků na světové ú-  
rovni. Dokladem udělení zlaté medaile Mezinárodní-  
ho veletrhu spotřebního zboží v Brně.

V roce 1978 za kapesní nože řady 100-NH-1 až 6 a  
řeznické nože 439-NH-4,5,6.

Druhá Zlatá medaile jubilejního X. MVSZ 79 byla u-  
dělena za lovecké zavírací nože řady 232-NP-1 až 6.

Je velkou ctí nejen pro výrobek, ale především pro  
výrobce získat oficiální uznání v mezinárodní sou-  
těži.

Udělení Zlaté medaile zvláště v roce 185. výročí za-  
ložení nožírské výroby je obzvláště významnou poctou  
a zároveň také pobídkou a závazkem k ještě zodpo-  
vědnější práci nožířů a všech zaměstnanců n.p. Mi-  
kulášovický kovoprůmysl.

Pobočné závody:

10 Benešov nad Pl.  
20 Česká Lípa

Provozy:

03 Mikulášovice  
11 Vilémov  
12 Mikulášovice  
13 Lipová

**Mikov**

NOSITEL ŘADU PRÁCE

185 let

TRADICE NOŽÍRSKÉ VÝROBY

V MIKULÁŠOVICÍCH

de LG prizorgis ne nur atestanton por la fianĉo, sed ankaŭ tradukis parton de urbestra festparolo. Amuzan amikan festenon preparis la anaro de la grupo en Kultura domo de Ĉs. ŝtataj fervojoj. Al la nova geedza paro ni deziras ĉion plej bonan.

De unu infanoj el fundamenta lernejo en Opatov, instruataj pri Esperanto de instr. Zdena Novotná, vizitis urbon Č. Třebová. Post trarigardo de muziklernejo kaj promeno en belega naturo estis por ili preparita tendarfajro kun rostitaj kolbasoj en ĝardeno de unu samideano. S-ano Pištora poste rakontis siajn travivaĵojn dum kongresoj de fervojistoj-esperantistoj kaj pri vivo de L.L. Zamenhof. Scioj pri Esperanto estis en konkursa tre sukcesaj kaj estis premiitaj per fragoj, dolĉaĵoj kaj insignoj.

**D O M A Ŝ L I C E** - Estis fondita nova E-klubo, loka grupo de ĈEA. Ni gratulas kaj deziras bonan starton.

**M Ě L N Í K** - Distrikta packonsilantaro per honora diplomo distingis LG pro la publika kaj paca laboro de ĝia membraro. La diplomo ornamas la sekretariejon de nia asocio.

Meza aĝo de la membroj estas 36 jaroj. Tamen inter ni estas 2 membroj 81-jaraj kaj 5 inter 70-78

vivojaroj. S-ano Jaroslav S t r a ŝ e k antaŭ ne-longe festis sian 75-jarigon kaj prof. Václav B r o ŝ í k sian 70-jarigon. Al ili, sed same al ĉiuj ceteraj ni deziras fortan sanon.

**M E R K L Í N** - KARLOVY VARY.

En urbeto Merklín apud Karlovy Vary okazis 22.-23.9.1979 la duan fojon kunveno de esperantistoj el Ercmontaro kaj GDR. La renkontiĝon partoprenis 24 reprezentantoj. En oficiala parto estis raporto pri evoluo de ĉefaj germanaj E-rilatoj, estis pritraktitaj novaj formoj de la kunlaboro, propagando kaj de la kursoj kaj estis senditaj salutoj okaze de la 30-jara jubileo de CLE de la KL de GDR kaj al CK de ASE en Moskvo okaze de la 62-jartago de Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Samideano Th. Auerbach /GDR/ emfazis gravan rolon de Pola Radio por Esperanto kaj ricevis korajn gratulojn okaze de la 75-jariĝo. Poste sekvis bildprogramo pri SET Lančov ktp. Sukcesa estis ekskurso al vilaĝo Oldříš.



Partoprenintoj de la dua kunveno en Merklín

P Ĥ Í B R A M - okaze de nova instruaro la rondeto volas vigligi sian vivon. La intencoj ne rilatas nur internan vivon, sed precipe la agadon ekster la klubo. Ni jam komencis: je la fino de aŭgusto ni partoprenis, same, kiel aliaj rondetoj organizitaj en ZK Uranové doly 3tagan ekspozicion, kiu titolis "El agado de niaj libervolaj rondetoj". Ni preparis 5 tabulojn, kie ni montris niajn celojn. Ĝis fino de septembro ni preparos programon por venonta jaro, kiu certe ekhavos bazajn celojn: ligi nian agadon kun Distrikta Packonsilantaro en

Příbram kaj kun iu el libervolaj rondetoj en la KD ZK Uranové doly. En distriktaĵoj aperas niaj informoj.

T Á B O R - En "Táborský zpravodaj" daure aperas informoj pri Esperanto de s-ano Knotek.

Z N O J M O - La klubo aranĝis la 24.9. vesperon pri la 64-a UK en Luzern, kun koloraj diabildoj kaj ekspozicio de bildkartoj, prospektoj kaj suveniroj. Parolis s-ano Polák, partopreninto de UK al multaj ĉeestantoj. Kurson por komencantoj, 15 gejunuloj, gvidas ekde septembro s-ano Rotrekl.

# Lingva angulo

Bernard Golden: KIO ESTAS "AKCENTO"?

Ekzameni la uzon de la vorto "akcento" en la sekvaj tri frazoj.

1. "La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo."  
/9-a regulo de la Fundamenta Gramatiko de Esperanto/
2. "Versajne la presisto ne havis sufiĉajn litertipojn kaj la ĝ kaj ĝ ofte aperas sen la akcento."  
/Horizonto, 1979, n-ro 3/
3. "Feliĉe ne ĉiuj Angloj kaj Usonanoj lernas laŭ tiu malprava regulo, kaj ĉiutage pli multaj, pli ĝuste instruitaj, parolas kun tute internacia akcento."  
/E. Privat, Historio de la Lingvo Esperanto/

La kunteksto en ĉiu frazo montras, ke "akcento" havas tri malsimilajn signifojn. En la unua frazo temas pri emfaza tono de vorta silabo. La verkinto de la dua frazo pritraktas signojn super literoj, do tie ĉi "akcento" estas sinonimo de "supersigno". La "akcento" de la tria frazo estas speco de parolmaniero. Tamen, se oni konsultas vortarojn de Esperanto, oni trovas en preskaŭ ĉiuj difinon de "akcento", kiu akordas kun la uzo de tiuor-

to nur en frazo n-ro 1. Jen la difino en Plena Ilustrita Vortaro /PIV/.

1. /gramatiko/ "Elifortigo de la voĉo en la prononcado de unu silabo en vorto."
2. /muziko/ "La relativa forto /emfazo/ de difinita pulso aŭ noto."
3. /figurasence/ "Klara kaj forta prononco de ĉiuj silaboj de vorto aŭ vortgrupo, por reliefigi ties signifon."

Kvankam estas evidente, ke tiu ĉi difino pravigas la uzon de "akcento" nur en la unua frazo, kiu estas zamenhofa, estas eble trovi aliajn ekzemplojn de la uzo de "akcento" en la verkoj de Zamenhof, kiuj ne havas tiun signifon, sed unu el la aliaj.

1. "La literoj akcentitaj estas tre neoportunaj kaj mi estus tre kontenta, se ili ne ekzistus." /Letero al E.Javal 1904.08.03/
2. "...mi volas proponi en mia projekto la sekvantajn ŝanĝojn: la verbaj formoj finiĝos per a k c e n t i t a j v o k a l o j /á, é, í, ó, ú/. En la vortaro ni tiam dirus: "o" signifas substantivon, -- "ó" signifas tempon estontan de verbo. M a l o p o r t u n a j o n tiu ĉi ŝanĝo ne prezentus, ĉar akcentitaj vokaloj ekzistas en ĉiuj presejoj de la mondo.." /"Al la demandoj pri la reformoj", La Esperantisto, 1894, n-ro 3/

Zamenhof uzas la adjektivon "akcentita" jen kun la signifino "supersignita", jen kun la signifino "pli forte prononcita". La origino de tiu ĉi uzo plej probable troviĝas en Praesperanto 2, kiun Zamenhof ellaboris en 1881-1882. Tiu frua formo de Esperanto havas tri vokalojn kun supersignoj -- "á, é, ó" -- kaj la silabo, en kiu ili troviĝas, ricevas la akcenton de la vorto. La signo super la vokaloj "á, é, ó" estas vera akcent-signo, same kiel identa signo en la hispana lingvo. Tamen, plej ofte tiaj signoj en etnolingvoj ne indikas la akcentendan silabon, sed funkcias por modifi la sonon de la literoj al kiuj ili estas ligitaj. En Esperanto oni prave nomas ilin "supersignoj", ĉar la cirkumflekso kaj renversita duoncirklo estas metitaj super la koncernaj literoj, sed tiu vorto ne taŭgas por signoj havantaj alian pozicion. Subsignoj troviĝas en la rumana /s, t/, la pola /e, e / kaj la vjetnama /e, o, u/; trasignoj en la kroata /š, đ / pola /ł, ł / kaj dana /ø /; kaj apudsigno en la slovakaj /l', t' /. En PIV troviĝas la vorto "kromsigno" sed eĉ eĉ pli preciza termino estas bezonata. "Diakrita signo" registrita jam en 1923 en la enciklopedia vortaro de

Wüster, inkluzivas ĉiujn signojn aldonitajn al literoj por fonetike modifi ilian prononcon.

La tria, ankaŭ evitenda, signifo de "akcento" sendube estas la rezulto de influo de etnolingvoj kiel la anglaj kaj la germana, en kiuj accent kaj Akzent havas ankaŭ la signifon "elparolo laŭ speciala maniero". Mi proponas jenajn esprimojn: fremda prononco, loka prononco kaj provinca elparolmaniero. Se temas pri tre orelagaca elparolmaniero, oni povas nomi ĝin prononcaĉo. Tiu speciala elparolado povas esti karakterizita, ne per misprononcado de la tuta lingvo, sed per substituo de certaj sonoj al aliaj, kaj tiurilate oni povas uzi vortojn kiel lispado, blezado, kartavado, zobalbutado, nazparolado kaj trenparolado. Kaj se la frazo havas apartan ritmon aŭ kadencan, oni povas paroli pri la intonacio aŭ frazmelodio.

Ja ne mankas vortoj kaj esprimon en Esperanto por priskribi la fenomenon de silaba akcentado, la funkcion de literoj kun diakritaj signoj kaj la variadon de elparolmanieroj. Oni devas nur lerni, kiel uzi ilin precize.

## AKUZATIV místo předložky DE

Esperantská předložka DE má mnoho významů. Její neuvážené používání ve všech případech by vedlo k nepřesnosti vyjadřování nebo i k nedorozumění.

Proto tam, kde je to možné, se buď vyhneme jejímu použití nebo její funkci zpřesníme přidáním i dalších slovcí, např.: ĉiuj foriris de apud li/1/; reveni de ĉe la amiko/2/; sin levi de ĉe la tablo; de post, de sur, de antaŭ; fare de, ekde, disde a jiné. Dr. Stanislav Kamarýt /"Esperantista" 3/1949, s.21/ dovozuje: "Bona stilisto klopodas eviti la prefikson DE ĉie, kie eblas; kaj ĝi eblas ofte." Je tam uvedeno několik příkladů nahrazení de jinými předložkami podle smyslu ve větě: en, ekde, por, pro, eh, for el, el de aj. Jak mi sdělil brněnský čtenář Starta, v časopise Hungera vivo jeho čtenář navrhl dokonce novou předložku "ob" s příkladem: trenado de azeno - osel táhne nebo je tažen? Návrh: "ob azeno" /což zůstane jen jeho návrhem 3/. Karel Pič, Ak., použil v esperantu dosud neznámé předložky "ab": forkliniĝo ab la tradicio /Oomoto, 1/78/, což redakce glosovala takto: disde, for de.

Málo používané a řekl bych, že v naší zemi téměř neznámé je nahrazení předložky DE 4.pádem následujícího předmětu. Např.: prodeĵ knih - vendado de libroj, anebo: vendado librOJN. Na první pohled se nám to jistě i zdá



KONCERNOVÝ PODNIK

**SOBĚSLAV**

nositel řádu práce

A ZÁVOD 02 JINDŘICHŮV HRADEC

výroba strojů  
a zařízení pro

textilní,  
pletařský

a konfekční průmysl


výroba

strojírenské

metalurgie a výroba

nástrojů, měřidel

a výrobních zařízení



VYRÁBĚJÍ, MONTUJÍ A PROVÁDĚJÍ SERVISNÍ SLUŽBU

ŠNEKOVÝ VYKLADAČ KV 70A

je určen pro vykládku sypkých hmot ze železničních vagonů.

ZÁVĚSNÁ LÁVKA ZL-6

slouží ve stavebnictví k dokončování a údržbě fasád domů

PRACOVNÍ PLOŠINA PP8A

nahrazuje dřevěné či trubkové lešení. Šířka plošiny 8m, nosnost 500 kg.

STAVEBNÍ VÝTAH NOV 500

slouží při stavbách k dopravě osob a materiálu. Nosnost 6 osob nebo 500 kg, zdvih 60m.

STAVEBNÍ VÝTAH NOV 1000A

je nepostradatelným pomocníkem při stavbě výškových budov, hal a věží. Nosnost 1000 kg nebo 12 osob, maxim. výška 100m.

**1960 - 1980**

**20 let výročí**

podniku

SEDLČANSKÉ

STROJIRNÝ, n.p.

SEDLČANY

DOMÁCÍ LIŠTOVNÍ POŠTA a  
POTRUBNÍ POŠTA PRO OCELÁRNÝ

dále vyrábíme lehkou prefabrikaci podle licence FEAL. Je to stavební systém na základě prvků hliník - ocel - sklo pro efektivní výstavbu továrních hal, administrativních budov, škol, hotelů apod.

## Analiza-sinteza metodo de grafika projektado

Kelkaj rimarkoj pri programita grafika projektado  
por demonstra propagando

Ne ĉiam pravus la fakulo asertanta, ke grafika projekto devas esti rezulto de spontana ideo: ke la sugesto elsaltis el la kapo de grafikisto tuj sur la paperon. Jes, okazas tiel - en la momentoj de subita ekscito: ekz. dum la milito sovetaj grafikistoj per siaj afiŝoj rapide reakciis je militaj eventoj.

Sed plejparte grafikaj projektoj - ekz. en komerca propagando - estas rezultoj de relative longa kaj komplika procedo. Se mi diras "relative" mi pensas pri la rapideco de la procedo. Ĉar la rapideco dependas antaŭ ĉio de la tempo necesa por kompreni la ideon de la mendinto. /Ne ĉiam la grafikisto estas profunda samfakulo kiel la mendinto - kiu eliaflanke komprenas sole sian fakon/.

Tial la unua supozo por bona rezulto de ĉiu grafika projekto estas - ĝuste kompreni la intencion - aŭ la propran, aŭ tiun de eventuala mendinto. Nur post bona kompreno de la intenco elekteblas la rimedo: difini kiel /aŭ per kio/ plej ĝuste esprimi la intencion. La rimedoj estas multaj - en grafika esprimado ekz. afiŝo, flugfolio, broŝuro, grafika anonco, grafika komponaĵo, ekspozicio ktp. La vojo de intenco ĝis la difino de unuopa rimedo nomeblas fundamenta analizo. Tiu ĉi analizo estas ĝenerala por tuta sfero de propaganda grafiko. Nur unu ĝia parto estas la solvado de la problemoj de demonstra propagando.

En la sfero de demonstra propagando la agado de ĉiu grafikisto estas ĉiam limigita: unue tial, ke la persono rekte prilaboranta la taskojn de propagando kutime estas unusola /projektanto-grafikisto en unu persono/; due tial, ke en niaj kondiĉoj de hobiĝ agado la prilaborata surfaco /rimedo/ estas ankaŭ sole unu: demonstra kesto, fenestro, klubejo ktp. Sperta grafikisto kun la funkcio de propagandisto povas plivastigi la nombron de la propagand-aĵoj. Ekz. tie, kie la Esperantistoj esprimas sin sole per la elmontra kesto, li povas plu uzi la murojn de la klubejo /murgazeto/ aŭ li povas eldonadi cirkulerojn, diversajn afiŝetojn ktp. Tio dependas ankaŭ de la rilatoj de ĉiu E-klubo al siaj entreprenoj kaj de la eblecoj de aliaj membroj.

as  
a  
j

imado  
n flan-  
lo 5t  
pesi-

TO

E




KONCERNOVÝ PODNIK

**SOBĚSLAV**

nositel řádu práce

A ZÁVOD 02 JINDŘICHŮV HRADEC

výroba strojů  
a zařízení pro  
textilní,  
pletařský  
a konfekční průmysl  
výroba  
strojírenské  
metalurgie a výroba  
nástrojů, měřidel  
a výrobních zařízení



VYRÁBĚJÍ, MONTUJÍ A PROVÁDĚJÍ SERVISNÍ SLUŽBU

ŠNEKOVÝ VYKLADAČ KV 70A

je určen pro vykládku sypkých hmot ze železničních vagonů.

ZÁVĚSNÁ LÁVKA ZL-6

slouží ve stavebnictví k dokončování a údržbě fasád domů

PRACOVNÍ PLOŠINA PP8A

nahrazuje dřevěné či trubkové lešení. Šířka plošiny 8m, nosnost 500 kg.

STAVEBNÍ VÝTAH NOV 500

slouží při stavbách k dopravě osob a materiálu. Nosnost 6 osob nebo 500 kg, zdvih 60m.

STAVEBNÍ VÝTAH NOV 1000A

je nepostradatelným pomocníkem při stavbě výškových budov, hal a věží. Nosnost 1000 kg nebo 12 osob, maxim. výška 100m.

**1960 - 1980**

**20 let výročí**

podniku

**SEDLČANSKÉ**

**STROJIRNY, n.p.**

**SEDLČANY**

DOMÁCÍ LISTOVNÍ POŠTA a  
POTRUBNÍ POŠTA PRO OCELÁRNY

dále vyrábíme lehkou prefabrikaci podle licence FEAL. Je to stavební systém na základě prvků hliník - ocel - sklo pro efektivní výstavbu továrních hal, administrativních budov, škol, hotelů apod.



## TRANSPORTA

nacia entrepreno, Chrudim

---

projektas, produktas kaj muntas ekipaĵojn por longdistanca

\* bendransporto en enteraj minejoj

ekipaĵojn por deponeja mastrumado plue ĝi elfaras levĉarojn kun flank-

\* ka ŝarĝeblo de portkapablo 5t kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesilojn

---

## EKSPORTA

# Crystal

BIERFABRIKO  
SAMSON

ČESKÉ BUDĚJOVICE

12°  
BIERO

nezvyklé, ale zamyslíme-li se nad tím, můžeme uznat prospěšnost způsobu vyjádření. Nikoliv neobvyklé to zní např. osobám s anglickou mateřštinou: tam je celkem běžné vynechání "of" /de/ hlavně v titulcích. Např. esp. tisk referuje, že dr. H. Tonkin uveřejnil též anglický článek s titulkem "Equalizing Language". Je to totéž, jako "egaligo lingvon" /místo "de lingvo", volněji přeloženo: egaligi la lingvon./

Zamenhof sám používal uvedeného způsobu např.: "Ĉi tiu konstanta kalkulado SIN al ia speciala gento..." Ruský esperantista Doroševič psal r. 1903 Josefu Krumpholzovi na Moravě: "Mi revis pri propagando inter vi laĝanaro sciencajn ideojn".

Ve větě persekutado de la malamiko - kdo koho pronásleduje? Nejisté! Upravíme: persekutado de la malamiko al /niaj cedantaj trupoj/, nebo: persekutado de la malamiko niajn cedantajn trupojn /se smyslem nepřítel pronásleduje/. Persekutado al la malamiko nebo persekutado la malamikon: zde je pronásledován nepřítel.

Lze sotva předvídat, že nahrazování předložky DE aktivem následujícího předmětu se stane brzy zcela běžným způsobem vyjadřování ve snaze vyhnout se, jak naznačil dr. Kamaryt, přílišnému používání DE. Je však nutné znát tento způsob, protože se s ním můžeme setkat v esperantském tisku. Např. v japonském Oomotu /jan-feb. 1973/ je vícekrát použito tohoto způsobu: la elekto la daton de la festivalo; proksima observado la japanojn; studado la vivojn kaj agojn de historiaj personoj; distingado la karakterizajn manierojn.

J.M.

- 1/ od něho /od jeho osoby
- 2/ t.j. z přítelova domu
- 3/ ve smyslu: fare de

## ni recenzas

Dr. I. Szerdahelyi: METODOLOGIO DE ESPERANTO, 377 paĝojn, - eldonis Universitato Eötvös Loránd, Budapest 1975.

"Metodologio de Esperanto" zahajuje sérii univerzitních učebních příruček a je určena studentům, kteří jsou již obeznámeni s metodikou cizích jazyků. Je to obecná metodologie, zabývající se problémy cizojazyčné výuky a speciálně vyučováním esperanta.

Učebnice je rozdělena na pět částí. V první se informativně hovoří o teorii jazykového vyučování, druhá je věnována výběru a segmentaci jazykového materiálu, následující dva oddíly se zabývají organizací a programem

výuky a poslední část je historickou studií vyučování esperanta.

Na koncepci celé knihy měl podstatný vliv fakt, že autor zamýšlel podat především praktickou ukázkou jak vyučovacích metod, tak programu výuky obecně. Proto je celý výklad zaměřen co nejkonkrétněji.

V první, historické části, je stručně nastíněn vývoj jazykového vyučování a jeho teorií počínaje antickými filozofy, přes humanismus, představitele přímé, překladové a jiných novodobých metod až po nejmodernější způsoby výuky založené na spolupráci s psychologii, kybernetikou a ostatními pomocnými vědami. Každá epocha a metoda je popsána velmi stručně, pokud možno shrnuta do přehledu v několika bodech, a je doložena rozsáhlou ukázkou originálního materiálu, takže čtenář získá názorný a plastický obraz. Kdo by se chtěl seznámit s teorií jednotlivých metod výuky podrobněji, najde ve výkladu četné odkazy na bibliografii v národních jazycích,

Druhá část je uvedena výkladem akademika G. Barczyho o výuce esperanta. Celý následující teoretický výklad, týkající se segmentace jazykového materiálu a komplexního lexikálního minima je totiž podle možností aplikován právě na esperantský materiál a doplněn přehlednými tabulkami.

Totéž lze říci i o třetí části, ovšem v kapitolách týkajících se komparistiky či interference bylo samozřejmě nutné použít ukázek z většího počtu jazyků, hlavně němčiny, ruštiny a francouzštiny.

Čtvrtý oddíl knihy přehledně informuje o vyučovacím a výchovném procesu na základě nejnovějších metod a teorií, s využitím nejdostupnější didaktické techniky. I tu je zařazeno několik konkrétních ukázek vyučovacích programů, dále se hovoří o organizaci a rozčlenění vyučovací hodiny včetně konkrétních metodických pokynů k optimálnímu způsobu výuky.

Závěrečný historický přehled je věnován výhradně esperantu, možností jeho dalšího rozšíření pomocí výuky ve školách i prognózám jeho metodologie. Knihu doplňuje obsáhlá mnohojazyčná bibliografie, rozčleněná podle jednotlivých částí knihy.

Autor, vedoucí katedry interlingvistiky na budapeštské universitě, soustředil ve své metodologii velké množství materiálu týkajícího se všech problémů výuky a umožňujícího nabýt základní přehled o problematice metodologie jako takové.

PhDr. V. Barandovská

## LIBROJ PRI AKTUALAJ LINGVAJ KAJ SOCILINGVAJ PROBLEMOJ .

Dum la lasta tempo plikreskas la intereso de lingvaj fakuloj pri la problemoj de internacia lingvo en kadro de ĝenerala lingvoscienco. Tio signifas, ke jam venas tempo por pliprofundigi esperantistan memkonscion, por malkovri ĝis nun ne konatajn aŭ ne tro prilaboritajn kampojn de Esperanto kaj por esplori science ĝiajn ligilojn kun la tuta homara kulturo.

Libro la plej interesa por niaj legantoj certe estas Esperanto - lingvo, movado, instruado; eldonis Centre Laborrondo en Kulturligo de GDR. Ĉi tiu libro reprezentas tre valoran antologion "por disponigi al studentuloj iom el tio, kio estas necese por ekz. ekzameniĝi sur pli altaj ŝtupoj". Ĉi enhavas kvar ĉapitrojn: I. Plan lingvaj projektoj kaj planlingvo; II. La lingvo Esperanto; III. Movado; IV. Instruado kaj V. Aldonaĵo.

Oni povas trovi ĉi tie multajn gravajn studojn dissemiatajn tra la esperantogazetaro kaj verŝajne malmulte konatajn, sed spite studindajn por la historio de la lingvo kaj por pli bona kompreniĝo al hodiaŭa situacio. Ekzemple en la ĉapitro II. oni publikas du studojn de Kalocsay /Esperanta vortfarado, Esperanta elparolo/, unu de Bokarĵov /Fonemo kaj sono en Esperanto/ ktp. Ni devus atentigi ankoraŭ je la IV-a ĉapitro, kiu enhavas k. a. gravan studon de A. Pettyn /Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto/. La tuta libro estas interesa, grava kaj skribita en bela klariga stilo.

Pasintjare aperis en Hungario alia interesa libro pri socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado /Budapest 1978/. Artikoloj kaj studoj de eminentaj fakuloj en Esperantologio pritraktas teorion kaj praktikon de la internacia lingvo kaj kun ĝi ligita movado. En la volumo ni trovas kontribuojn pri historio, pri ideaj fontoj kaj pri perspektivoj por la estonteco. En ĉi tiu lasta parto de la libro oni memkompreneble ne trovas priskribon de klara kaj science motivebla perspektivo de estontaj sortoj de la lingvo. Malgraŭ tio ankau ĉi tiu parto igas la leganton konsideri multajn eblecojn kaj vidi en Esperanto ne nur "helplingvon", sed ankau enkondukilon en pli vasta sfero de lingvosciaj kaj kulturaj problemoj.

En multaj studoj publikitaj en la libro certe vekigos intereson artikolo Socialismo kaj Internacia Lingvo /S.N. Podkaminer/, kie la aŭtoro montras la firmajn ligilojn inter Esperanto, socialismo kaj pacmovado. Alia studo /Esperanto dum la Tria Regno/ de U. Lins temas pri naziismo kaj ĝia malamika rilato al Esperanto.

En la jaro 1975 okazis en Kumrovec /Jugoslavio/ lingvistika simpozio organizita de la Internacia Kultura Servo en Zagreb. Sub la sama titolo Lingvistika Simpozio/ la Servo eldonis kolekton de ĉiuj kontribuaĵoj/Zagreb 1975/.

Principa temo de la Simpozio estis "Esperanto kiel lingvistika bazo de universala gramatiko kaj de meta-lingvo kaj kiel universala lingva fenomeno".

El dek prelegoj kaj referaĵoj kiel la plej valora por la temo estis aprezata la referaĵo de D. Brozović, kiu difinis la strukturan pozicion de Esperanto interne de la monda lingva korpo: laŭ tipologia vidpunkto ĝi okupas mezan pozicion tra la lingvoj de la mondo, laŭ ĝia gramatika strukturo ne kazuas la malfacilaĵojn por kiu ajn lingvano en la mondo.

Ĉeestantoj, profesiaj lingvistoj, surbaze de la modernaj lingvistikaj konoj, pritraktis Esperanton el la plej diversaj flankoj kaj disponigis ĝiajn objektivajn valorojn ankaŭ por lingvaj fakuloj ne regantaj Esperanton.

Fine de la libro oni publikis konkludojn, kiuj enhavas tre gravajn ĝeneralecojn por la scienca aprezado de Esperanto. Oni konkludis ke Esperanto estas standarda lingvo kun tute samaj kvalitoj kiel ĉiuj aliaj standardaj lingvoj en la mondo.

Oni substrekis la rolon de Esperanto en tradukado... /kiel peranto aŭ pontlingvo/.

Esperanto estas la sola lingvo uzebla kiel programlingvo por komputiloj sen esti kripligata. Esperanto estas pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo /eksperimenta instruado inter 1971-5 en Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio/.

Fine, ni povas sumi: Ĉiuj tri libroj malfermas novajn horizontojn ne nur teorie - por kompara kaj kontrasta lingvoscienco - sed ankaŭ praktike - por eluzi ilin en tute novfundamente bazata propaganda laboro.

PhDr Sáva H e ř m a n

**I N S T R U A A M U Z O**, dua volumo de krucenigoj piritita per humuraĵoj, bele vestita, sur kvalita papero /55 paĝoj **K5** kun aldonita kuponkarto/ estas ĝojiga pro la nekutima enhavo.

Stano Marček majstre kunligis plej diversajn formojn de krucenigojn kun Stano Markovič, kies desegnaĵoj spritaĵoj eminente kompletigas la verkon, kiu celas doni distron, sed ankaŭ plivastigon de lingvosciado al ĉiu, kiu emas utile pasigi liberan tempon.

Lingve kontrolis E.V. Tvarožek. Aĉetebla ĉe ĈEA -14, -K&S aŭ 5 irpk.

# KDS

## Sedlčany

PRODUKTAS KVALITAJN TRANĈILOJN POR :

- kuirejoj kaj viandvendejoj
- ĝardenoj diverspecajn tondilojn
- prilabori kortbirdaron specialajn tondilojn
- viaj manoj kaj piedoj specialajn ilojn de higieno

EXPORTAS : MERKURIA PRAGA, ĈSSR

# el leterkesto

## INAŬGŬRO DE MEMORTABULO AL LA UNUAJ LABORISTAJ ESPERANTISTOJ EN P Ř Í B O R

Kun partopreno de 18 personoj, inter tiuj ankaŭ ita-  
la samideano, estis la 8-an de julio ĉ.j. en la nordmo-  
ravia urbo Přebor solene inaŭgurita memortabulo al la  
unuaj pioniroj de laborista Esperanto-movado.

En la jaro 1897 dum fondigo de Social-demokratia par-  
tio en la loka fabriko "Tatra" /tiam vagonfabriko/ for-  
mis tieaj partianoj rondeton, en kiu oni lernis la In-  
ternacian lingvon. Iniciatinto de tiu ĉi historia even-  
to estis la laboristo Josef Káňa, kiu proponis al siaj  
kamaradoj lernadon de Esperanto. La proponon oni akcep-  
tis kaj J.Káňa estis komisiita prizorgi lernolibrojn.

La unua instruanto de Esperanto fariĝis k-do Souša ,  
laboristo el Kopřivnice. La adeptoj de Esperanto kunve-  
nadis post pena 12-hora ĉiutaga laboro en la gastejo de  
s-ro Lýsek apud la urba stacidomo, kie nuntempe situas  
la hotelo "U nádraží." Post kvarsemajna instruado, k-do  
Souša forvojaĝis en Ruslandon kaj la instruado daŭrigis  
en la private domo de J.Káňa.

Pri tiu ĉi frutempa Esperanto-kurso informis la mal-  
juna laboristo Joháno Kuláč el Veska-Přebor, mortinta  
en la j. 1956, tiam jam 82-jara.

La urbeto Přebor tial aliĝas al la urboj kun tre mal-  
nova Esperanto-movado kaj verŝajne kun la malplej nova  
Esp.movado laborista en Ĉeĥoslovakio.

A. Satték



Ceestantoj de la solena inaŭguro de la memortabulo  
en Přebor

Al D-ro L. FRITSCH en ĈESKÉ BUĎĚJOVICE

Kun kreskantaj intereso kaj plezuro mi tralegis la numeron de LA PROGRESO, kiun vi transdonis al mi en Lu- cerno, kaj kiu aperadas sub via redakto.

Ĝi plenumas bonege rolon ege bezonatan inter la E - gazetoj, nome ĝi donas simplan kaj generalan legaĵon por la ordinara, kaj precipe la nova, parolanto de Esperanto. Mi esperas, ke vi faras vian eblon ankaŭ internacie distribuigi la revueton, ĉar ĝi ja meritas internacian legantaron, interalie kiel modelo por imito ankaŭ en aliaj landoj.

Kore salutas ,

  
Humphrey Tomkin



Al Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
P r a ĥ a

Karaj samideanoj,


mi legis pri via asocio kaj rapide skribas al vi, ĉar mi delonge deziras korespondi kun vialandaj esperantistoj.

Mi estas 30-jara profesoro kaj mi tre ŝatas mian laboron. Mi laboras je la universitato kaj parolas kelkajn lingvojn. Ankaŭ lingvistiko kaj literaturo estas mia ŝatokupo.

Vi povas doni mian adreson al ĉeĥaj esperantistoj por korespondi kun ili. Mi esperas, ke niaj interrilatoj por la Internacia lingvo restos daŭraj kaj pliprofundigos.

Ricevu la plej korajn salutojn de via nova kuba amiko

Prof. Mario G o n z a l e z  
Paz ~~159~~ 159, Santos Suarez  
H A B A N A 5 CUBA



SALUTO DE E-GRUPO EL FINNLANDO,

kiu vizitis nian asocion /vidu Starto 4/79/:

Sabaton 8.9.1979 parto de nia grupo kolektiĝis en mia hejmo por memori nian viziton ĉe vi.

Tutkorajn salutojn:

Heta Käsälä kaj 17 subskriboj.....



# KRONIKO

PLZEŇ - La 28.6.1979 longjara membro de EK Pizeň sano Arnošt ČERMÁK 75 jariĝis. Elkore gratulas kaj ĉion plej belan kaj bonan deziras la geklubanoj.

KARLOVY VARY - En aĝo de 75 jaroj forpasis la 24.9. 1979 Jan LIČKA, longjara membro de EK kaj delegito de UEA en Karlovy Vary. Honoron al lia memoro.

GOTTWALDOV - La 28.8. 1979 mortis longjara prezidanto de LG kaj delegito de UEA Otakar MATULÍK en aĝo de 76 jaroj. Laŭprofesie ĉemiiŝto li apartenis al tiuj oferemaj kaj fidelaj membroj de nia movado, kiuj senlace laboris por esperantismo. La traduko de la libro "Fragmentoj de la vivo" de M.Kudeříková estis grandparte lia merito. Ni ne forgesu lin.

## Dary svazu

Ni dankas al ĉiuj pro donacitaj sumoj:

Vojtěch TROJAN el Žacléř 600 Kčs, Jaroslav DAVID el Pustějov 24 Kčs, Miroslav RYBÍN el Lipt.Mikuláš 4 Kčs.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Barbara CVETKOVA, Ĉkalovskij 60-91 197137 LENIN-DRAD, Sovetunio


"Zprávy Ĉs. esperantského výboru" kaj aliajn iamajn periodaĵojn serĉas kolektanto. Unue skribu al Zđ. H r š e l, Botanická 28 602 00 BRNO

Aperis INSTRUA AMUZO /Krucenigmoj kaj humuro, 2a vol./, libro por ĉiu, kiu ŝatas amuzon kaj distron. Sendante 14 Kčs mendu ĉe S.MARČEK, Hurbanova 4/11, 03601 MARTIN

## INFORMOJ DE SEKRETARIO

### NOVA FORMO DE PROPAGANDO


Nia asocio eldonis pli ol unu milionon da etiketoj sur alumetkatoloj kaj traktis pri la distribuo en vendejoj. Trikolora teksto propagandas lernadon de Esperanto laŭ korespondaj kursoj, kiujn eldonis nia asocio. Infor-



**esperanto**  
 SNADNO  
 DLE  
 PISEMNYCH  
 KURSŮ

Informace Český esperantský ústav,  
 Jiráka 10 - 110 00 Praha 1

MOJ-140-010-1000-01-10-10



mu nin pri ŝetebleco en viaj loglokoj.  
 La asocio havas por kolektantoj kelkcentojn da tiuj etiketoj. 5 pecoj kostas 1 Kčs plus poŝtelspezojn. Ne metu malpli ol 10 pecojn. Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

NOVAN PROJEKTON DE STATUTO DE UEA, kiu estis akceptita dum la Universala kongreso en Luzern, ricevis ĉiu nia grupo kaj funkciuloj. Ankaŭ pri ĝi informis la estraro dum la kunveno de asociaj funkciuloj en Mělník komence de oktobro 1979.

Niaj membroj rajtas esti informitaj dum kunvenoj pri la statuto kaj informi sekretariojn pri eventualaj bezonaj aldonoj. Sed bv. skribi al ni senprokraste.

PRO DIVERSAJ TEKNIKAJ KAŬZOJ en presejo n-o 4/79 malfruigis unu monaton. Eblas konstati: ne ĉiam ni kulpas. Ni petas tamen pardonon.

NOVAJ TERMINOJ POR S T A R T O 1980

Se vi volas, ke viaj artikoloj, informoj, anoncoj aŭ aliaj kontribuajtoj aperu en koncerna numero de STARTO 1980, ni devas ilin ricevi maksimume en jenaj terminoj :

- por numero 1 .... 18.1.1980, por numero 4 .... 11. 7.1980
- por numero 2 .... 14.3.1980, por numero 5 .... 19. 9.1980
- por numero 3 .... 16.5.1980, por numero 6 .... 7.11.1980

ĈIUJ NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ povas sammaniere reaboni STARTON por estonta jaro. Ne forgesu kaj informu tujn viajn perantojn. Ni devas scii dum decembro preparotan kvanton. Se enhavo kaj kovrilo de Starto plaĉas al vi, skribu al ni kaj ĉefe proponu la abonon al viaj gesamideanoj. Skribu al ni ankaŭ la kritikon! Vi, kiuj ne abonas pere de perantoj, turnu vin rekte al nia asocio.

PLENKUNSIDO DE LA CENTRA KOMITATO DE ĈEA okazos dum la 24-a de novembro en Prana. Viajn eventualajn proponojn sendu al nia asocia adreso.

RIPORTO SKRIBITA EN LA PENDUMILA MAŜO, mondkonata libro de Julius Fučík jam estas presita. La libro verŝajne estos havebla je fino de ĉi tiu jaro. Fremdlandaj abonantoj povas jam nun ĝin aboni ĉe siaj perantoj aŭ rek-

Už jste četli

# HUNGARA VIVO?

Časopis Maďarského esperantského svazu s přitažlivým, zajímavým obsahem. Luxusní vzhledem, zajímavý svými články. Hungara Vivo vychází šestkrát ročně, s mnohobarevnými obálkami a dvoubarevnými vnitřními stranami.



Je možné jej objednat na adrese: PNS — dovoz tisku, Vinohradská 46, 120 43 PRAHA 2 — Vinohrady  
Během roku dostanete celkem 240 stran textu, nepočítaje obálky  
Předplatné na jeden rok je Kčs 27,60

Z obsahu:

Přehled světových esperantských spisovatelů s ukázkami

Kapitoly z historie maďarského národa

Výtažky nejzajímavějších článků z esperantského tisku

Recenze, jazykové poznámky

Křížovky, dopisování poezie

Panorama událostí v kultuře

a další zajímavé články  
najdete v časopise

**HUNGARA VIVO**

te ĉe nia asocio. Oni kalkulas kun maksimuma prezo 20 Kĉs. Eldonkvanto 5 mil volumoj, formato A5.

ĈIU EKSTERLANDA ESPERANTISTO, kiu volas havi nian numeron de P A C O, kiun ni ĵus eldonis, povas ricevi senkoste tiun kajeron. Informu viajn perantojn aŭ ĈEA.

SWAZOVÉ ZKOUŠKY se budou konat v Praze 19.dubna 1980. Uzávěrka přihlášek je 23.února 1980. Zájemci hlaste se na adrese: Karel F r a n c, Dukla 2287 PARDUBICE-53002

MS PŘEROV NABÍZÍ pro 6 členů ČES pětidenní pobyt v MLR v Szombathely v prázdninových měsících. Místní E-skupina se postará o ubytování, stravování i program svých hostů. Cena za 1 osobu mezi 400 - 500 Kĉs mimo jízdné. Bližší informace podá MS Přeřov-750 00, Přeřovské strojírny ZK ROH, Horní nám.8

RADIO ROMA /RAI/ITALIA RADIO/ elsendas en Esperanto ĉiun dimanĉon de 21.00 ĝis 21.20 laŭ mez-europa tempo, sur jenaj ondlongoj/frekvencoj:

metroj	25,42	30,90	41,24
kilohercoj /kHz/	11800	9710	7275

Per ĵusa aranĝo inter la Itala Radio kaj la prizorganto de la Esperanto-rubriko /Antonio de Salvo/, estis interkonsentite ke la Esperanto-elsendo ĝuos la saman traktadon kiel la rubrikoj en aliaj lingvoj.

La sola pruvo, ke radiostacio estas aŭskultata, estas la nombro kaj la kvalito de la korespondantoj, kiuj alvenas. Se oni volas, ke la Esperanto-elsendo de Radio Roma daŭru kaj plibonigu, oni skribu! Ne estas nepre neĉese, ke oni laŭdu: ankaŭ plendoj pri neebleco de aŭskulto aŭ eĉ pri netaŭgeco de la enhavo povas utili. Laeble oni ĉiam aldonu kelkajn teknikajn detalojn /aparato, anteno, uzitaj ondlongoj/frekvencoj, kvalito de la aŭskulto/; kaj, se oni audis la efektivan programon, oni menciu almenaŭ unu programeron. La adreso:

RADIO ROMA - ESPERANTO, C.P.320 I-00100 ROMA CENTRO -  
CORR. /ITALUJO/

---

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, Jilská 10, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá Dr. Jaromír Jeremáš CSc a Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Labašta, přílohy Jeroslav Klement. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven. Předáno do tisku 19. října 1979. Dohledací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvím pošt Praha, pod č. j. zn. P/1 - 1267/79 ze dne 6. dubna 1979.



**OFERTAS AL ĈIUJ PROJEKTISTOJ  
NOVAN EKSTERVANDAN PANELON**

**F 300**

**POR LA UZO ĈE VANDIZO  
DE INDUSTRIOJ KONSTRUAĴOJ**

**La teĥnikajn kondiĉojn sendas  
kaj pluajn informojn donas livera  
fako de la entrepreno**

**tel. 7593 21-4**

**Stavokonstrukce np.**

**Praha 1**

**U pŭjčovny 9**



**AUTOBAZAR**  
ENTREPRENO «KLENOTY»